

## Intervjuo kun Andreas Künzli pri lia Zamenhof-biografio

*Kial kaj kiel vi venis al la ideo verki Zamenhof-biografion en la germana lingvo ?*

Nu, alproksimiĝis la centjara Zamenhof-datreveno (1859-2009) kaj mi havis la penson, ke oni nepre devus krei iun solidan, sciencan nacilingvan Zamenhof-biografion.

*Kial do en la germana lingvo kaj ne en Esperanto ?*

En Esperanto jam ekzistas kelkaj Zamenhof-biografioj. Jam delonge mi sekvis la ideon de nacilingva Zamenhof-biografio en la germana lingvo, ĉar tio simple mankis.

*Ĉu unue vi komencis verki la tekston kaj poste serĉis eldonejon ?*

Mi komencis verki la biografion en la jaro 2008 kaj en 2009 komencis serĉi eldoniston. Mi skribis inter alie al Rowohlt, Suhrkamp, C.H. Beck, Bleicher.

*Kaj kiu estis la rezulto de tiu sondado ?*

Rowohlt kaj Suhrkamp respondis, ke ili ne interesiĝas pri Zamenhof-biografio en la germana, ĉar laŭ ili la publika intereso ne estas sufiĉe granda. Bleicher respondis, ke tiu eldonejo ne plu ekzistas. C.H. Beck ne reagis.

*Kaj kiel vi agis plue ?*

Nu, mi daŭrigis verki la tekston, kiu fariĝis pli kaj pli ampleksa, kaj kiu alprenis formon, kiun eblis submeti al iu serioza eldonisto. Por sondi la intereson pri kunlaboro mi skribis inter alie al kelkaj gvidaj membroj de iuj Esperanto- kaj interlingvistikaj organizoj en Germanio.

*Kaj kio okazis ?*

Ĉi tiuj gvidaj membroj respondis, ke ili ne havas tempon. De iuj aliaj sekvis du komercaj reagoj por eldoni la libron, sed tiuj proponoj ne interesis min, kaj mi konsideris ilin kiel rezervaj. Pro tio mi ankoraŭ kontaktis la eldonejon Harrassowitz en Wiesbaden.

*Kiel ĉi tiu eldonejo reagis ?*

Mi ricevis la surprizan respondon, ke mi sendu la manuskripton al la respondeca eldonanto de la Juda Serio. Do, mi sendis ĝin al prof. d-ro Karl Erich Grözinger en Berlino.

*Kiel finiĝis tiu sondado ?*

Pozitive. Post monato kaj duono prof. Grözinger afable respondis al mi, ke li estas interesata eldoni mian tekston kadre de la Juda Serio de la eldonejo Harrassowitz.

*Kiujn konsekvencojn tiu akcepto havis ?*

Tio signifis, ke mi eniris la oficialan eldon-programon de la eldonejo Harrassowitz kaj ricevis ĉian profesion apogon koncerne la formatigon de la verko. La dua, eĉ pli grava konsekvenco estis finverki la libron , comme il faut'.

*Kia eldonejo estas Harrassowitz ?*

La eldonejo Harrassowitz estas germana akademia eldonejo en la urbo Wiesbaden, Hessen. Ĝi eldonas ĉirkaŭ 150 titolojn jare, librojn kaj periodaĵojn, monografiojn kaj disertaciojn, pri orienta, slava, juda, eŭropa temaroj. La eldonejo estas parto de la firmao Otto Harrassowitz GmbH & Co. KG, kiu estis fondita en 1872 de Otto Harrassowitz en Lepsiko (Leipzig), kiu estis brokantisto kaj vendisto de akademiaj, sciencaj kaj esploraj verkoj. Ĝi estas unu el la ĉefaj sciencaj eldonejoj de Germanio. Ĝi publikigas krom en la germana pli kaj pli librojn ankaŭ en la angla lingvo. En ĝia stoko troviĝas proksimume 3000 diversaj titoloj. En la interreto la eldonejo estas trovebla sub la adreso <http://www.harrassowitz-verlag.de>.

*Kiuj estas la kondiĉoj por aŭtoroj ĉe Harrassowitz ?*

La eldonkvantoj por tiaj niĉoproduktoj estas malaltaj, la fina unuopa vendoprezon de la libro estas relative alta, honorario ne estas pagita, kaj la aŭtoro devas trovi la subvencion aŭ mem pagi la aldonan koston por la presado. Apud la dek liberaj ekzempleroj, kiujn la aŭtoro ricevas, li estas instigata aĉeti almenaŭ dek pliajn ekzemplerojn por kontribui al la produkto-kostoj. Laŭkontrakte, la aŭtorajn kaj rabate aĉetitajn ekzemplerojn oni ne rajtas vendi.

*98 eŭroj por tia libro estas nekutime alta prezo en Esperantujo, ĉu ne ?*

Jes, la prezo estas iom ŝoka, sed nenio eksterordinara sub la regantaj eldonkondiĉoj. Mi klopodis atingi malaltiĝon de la prezo ĉe la eldonejo favore al la Esperanto-klientoj, sed mi bedaŭrinde ne sukcesis. La kalkulado de la eldonejo estas tre rigora kaj strikta kaj ne permesas tro grandan spacon por prezredukto. Maksimume oni povas elekti, ĉu oni deziras molan aŭ malmolan kovrilon, kio povas esti diferenco de kelkcent eŭroj, tio jam estas ĉio, sed tio eĉ ne influas la vendoprezon. Pro speciala produkto-konstelacio mi havis la eksterordinaran ŝancon ricevi malmolan kovrilon kontraŭ la kostoj de mola.

*Kie la libro estis presita ?*

La libro estis presita kaj bindita, cetere en tre mallonga tempolimo, de Memminger MedienCentrum Druckerei und Verlags-AG en 87700 Memmingen, Bavario.

*Kiu kreis la kovrilon ?*

La kovrilo estis kreita laŭ la modelo de la ekzistanta skemo por tiu libroserio kaj de miaj sugestoj kaj deziroj. Ĉar la kvalito de la bildo devis esti centprocente bona, mi elektis tiun bildon, cetere de mi tre ŝatatan, post kiam montriĝis, ke estas tre malfacile trovi kvalite taŭgan ilustraĵon por la kovrilo. Aro da bildoj troviĝas cetere ankaŭ en la apendico, kiu ampleksas 24 paĝojn. Estas preskaŭ mirakle, kiel el ege malnovaj kaj kvalite malfacilaj bildoj eblis krei kvalite tre bonan represon sur tiu papero.

*Esperanto-libroservoj verŝajne akiros malmultajn ekzemplerojn por la revendado, ĉu ?*

Povas esti. Libroservoj ricevas pli malpli la kutimajn revendistajn rabatojn, en la kazo de Harrassowitz 25% ekde la unua ekzemplero kaj 30% ekde 10 ekzempleroj.

*Ĉu pro tiuj specifaj cirkonstancoj vi ne timas, ke pro la germanlingva teksto via biografio reduktiĝas al relative limigita intereso- kaj lego-publiko ?*

Jes kaj ne. Sed la libro ne estis verkita por la ‚amaspubliko‘. Harrassowitz produktas sciencajn librojn por sciencaj bibliotekoj kaj institucioj. Privataj klientaroj mendas kutime tra librorvendistoj, kiuj siaflanke havigas al si la menditajn librojn ĉe la eldonejo. Dekomence mi intencis verki biografion en la germana lingvo, por diskonigi la personecon de Zamenhof al nova germanlingva aŭ nacilingva publiko. En Esperanto ekzistas sufiĉe multaj Zamenhof-biografioj, sed en la germana lingvo neniu. Necesas malfermi zamenhofajn, esperantologiajn kaj interlingvistikajn temojn al eksteraj publikoj por vekii ilian intereson. Tiucele necesas verki nacilingve. Tio eble povus esti la plej taŭga speco de ‚propagando‘, kvankam ĉe mia libro neniel temas pri Esperanto-propagandaĵo. Alia avantaĝo estas, se oni eldonas libron ĉe eldonejoj kiel Harrassowitz, ke tia libro estas tuj atentata kaj inkluzivita en la distribusistemon de aro da gravaj retaj libroservoj kiel amazon, bol, ebay, neuebuecher, ktp.

*Ĉu ekzistas la intenco traduki vian libron al Esperanto ?*

Se la volo kaj la objektivaj kondiĉoj por tia projekto ekzistas, kial ne traduki, aŭ pli bone adapti ĝin, al Esperanto ? Sed mi ne scias kaj iom dubas, ĉu tio valorus la penon. Estus tro granda kaj tro malfacila laboro, kaj sen buĝeto komplete sensenca.

*Ĉu estis kunlaboro kun aliaj Zamenhof-historiistoj ?*

Mi havas kontakton kaj kunlaboras kun Esperanto- kaj Zamenhof-historiistoj jam de 30 jaroj. La ĉefan materialon por tia biografio mi posedas en mia privata biblioteko. Se mi bezonas ion alian, mi facile povas aliri planlingvajn arkivojn aŭ konsulti aliajn fakulojn.

*En kiuj rilatoj via Zamenhof-biografio diferenciĝas de la libroj de Privat, Ziółkowska, Centassi/Masson ...*

Mia libro celas nek prizamenhofan hagiografiadon, nek Esperanto-propagandon. Ĝi estas verkita laŭ la kutimaj normoj de scienca historiografio en la ‚ekstera mondo‘. Ĝi kritike traktas (aŭ ignoras) la fontojn kaj per tio la mitojn kaj legendojn disvastigitajn de tiuj aŭtoroj.

*... kaj Korĵenkov ?*

Mia libro estas pli ampleksa, pli rigore scienca, ĝi utiligas pli da fontoj kaj konsideras pli vaste la historian kuntekston de la tiama epoko. Certe kelkajn utilajn pli freŝdatajn studojn de Korĵenkov kaj de aliaj esploristoj, kies zamenhofologian laboron mi tre estimas, mi povis utiligi ankaŭ por mia Zamenhof-biografio.

*Sed via libro ja certe baziĝas sur la fontoj de la libroj de la menciitaj aŭtoroj ?*

Jes certe, neeviteble, kaj volonte, sed ne nur. La demando estas ankaŭ kiamaniere oni re-prezentu la resursojn kaj informojn liveritajn de tiuj aŭtoroj, kiuj grandparte traktis tiujn fontojn ne science, sed amatore aŭ laŭ la stilo de rakontlibroj por laikoj kaj infanoj. La kerna demando estas, ĉu oni simple remaĉu aŭ nove, kritike pripensu tiujn fontojn kaj informojn kaj eventuale rezignu pri la reuzado de certaj informoj, kiuj ŝajnas strangaj aŭ nefidindaj. Se oni tamen volus uzi tiajn fontojn, en tiu kazo oni devas ilin komenti.

*Se via libro estas sciencece verkita, ĉu ĝi estas ankoraŭ komprenebla al laikoj kaj infanoj ?*

Mi esperas, ke mia libro estas legebla por ĉiuj. Nenion elitecan aŭ pseŭdodoktan mi celis verki, tendenco, kiu estas bone konata en Esperantujo. Mi klopodis verki glatan tekston en la germana lingvo, Multaj resursoj ja devis esti tradukitaj el Esperanto, la rusa kaj aliaj lingvoj.

*Kiuj estas la trajtoj, la specialaĵoj de via libro, kiu distingas ĝin de aliaj ?*

Kiel dirite, mia libro traktas la biografion de Zamenhof en la kunteksto de la historio kaj de la tempo, en kiu li vivis. Do, unuafoje estas prezentita la politika, socia kaj kultura fono de Ruslando kaj Eŭropo, kaj la studo fokusiĝas sur la judaj aspektoj, ĉar tiuj ja estas evidente tre gravaj ĉe Zamenhof.

Alia avantaĝo de tiu libro certe estas, ke mi havis la okazon konsideri la novajn studojn, kiuj estis faritaj dum la pasinta tempo. En tiu rilato mia libro estas eĉ tre aktuala.

*Vi aludas la homaranismon, ĉu ne ?*

Certe. Esperanto kaj la hillelismo (de 1901), poste homaranismo (ekde 1906), estis origine esence judaj aferoj, parto de la solvo de la „juda demando“ de la tempo de Zamenhof, aperintaj en la kunteksto de la cionismo. Krom Maimon, la aŭtoro de la fama „La kaŝita vivo de Zamenhof“, kiu ja brile okupiĝis pri la judaj aspektoj ĉe Zamenhof, sed eble iom tro unuflankece, la „klasikaj“ Zamenhof-biografioj ĝis nun grandparte subpremis la judajn aspektojn ĉe Zamenhof. Inter alie ĉar ne estis oportune emfazi la judecon de Zamenhof (cetere laŭ ties propra rekomendo). Kaj pri la antisemitismo en konkretaj historiaj periodoj ni tute ne parolu. En la lasta tempo oni pli forte atentis tiujn judajn aspektojn, ĉar nuntempe estas eĉ oportune trakti judajn temojn. Oni devas vidi ĉion en la vasta historia kunteksto, en unu kohera sistemo, se ni jam palavras pri kibernetiko (sen scii kion ĝi signifas), kaj tion mi faris, aŭ provis fari. Ĉe Zamenhof tiu

sistemo oscilas en la juda-rusa-pola triangulo, ĉu ne. Ĝuste tiun sistemon necesas analizi.

*Ĉu vere Esperanto kaj la homaranismo estas judaj aferoj ?*

La efektiviĝo de la idearo de L.L. Zamenhof havas du fontojn: La unua ideo de Zamenhof, la lingvo Esperanto (kiu tiam ankoraŭ ne nomiĝis Esperanto), aperis en 1887 kadre de la internacilingva ideo, la senpera juda konekto mankis (ĉar pri tio en la 'Unua Libro' nenio estas skribita). La dua ideo de Zamenhof, la hillelismo, poste nomata homaranismo, havas sian fonton en la Hillelismo de 1901, sed Zamenhof eĉ pensis pri tiuj ideoj jam pli frue. La hillelismo estas projekto de la solvo de la juda demando, unuavice en la Ruslanda Imperio, en la ruslanda kunteksto. En tiu projekto Zamenhof parolas pri neŭtrala lingvo, nomata Esperanto, kiun li proponas por solvi la lingvan demandon de la judoj. La konsekvencojn de tiuj ideologiaj premisoj mi traktas detale en mia Zamenhof-biografio.

*En la libro ekzistas diversaj 'ekskursoj' al temoj, kiuj ne estas rekte ligitaj kun la biografio de Zamenhof. Kial tio ?*

La ĝisnunaj Zamenhof-biografioj estis verkitaj grandparte ekster la historia kaj politika kunteksto de la tempo, en kiu Zamenhof vivis. Per la aldono de tiuj 'ekskursoj' mi celis kompensi tiun mankon. Ekzemple mi volis montri la specifaĵojn – kaj antagonismojn – de la historio de rusoj, poloj, judoj, por trakti la Zamenhofan verkon en la triangulo rusa-pola-juda. Inter alie mi celis ilustrigi, ke tiuj etnoj havis kulture apenaŭ ion komunan, pro kio ilia kunekzistado montriĝis malfacila. Per la 'ekskurso' pri la antisemitismo mi intencis rememorigi, ke Zamenhof vivis en tempo, en kiu regis forta kontraŭjuda etoso, kiu kulminiĝis en la dua mondmilito, dum kiu la judoj estis kvazaŭ civilize elsarkitaj kaj dum kiu ankaŭ pluraj anoj de la familio Zamenhof mem pereis. Lige kun la hillelismo necesas ankaŭ paroli pri la cionismo, lige kun la lingvistikaj konsideroj de Zamenhof ankaŭ pri la historio de la lingvofilozofio, juda kaj alia. Ĉiuj tiuj kromtemoj estas gravaj laŭ mi por provi pli bone kompreni en kiuj cirkonstancoj Zamenhof pensis kaj agis.

*Kion eblas ankoraŭ diri pri via libro ?*

Eble unu triono konsistas el apendico. En ĝi aperis germanlingvaj tradukoj de Zamenhofaj leteroj, traktaĵoj kaj prelegoj. Unuafoje aperas la Hillelismo de 1901 en la germana lingvo, kiun mi speciale tradukis por tiu libro el la rusa originalo.

*Ĉu ne estis malfacile traduki tiun rusan tekston pri la hillelismo ?*

Ne. Temas pri sufiĉe facila teksto. Kelkfoje ĝi havas iom longajn, komplikajn frazojn, tiel ke oni devas bone kompreni, kiuj (refleksivaj) eroj rilatas al kiuj aliaj eroj de tiuj frazoj. La Esperanto-traduko (kiu mem estas iomete komplika aŭ stile ne tro eleganta, ĉar laŭvorta) helpis al mi kompreni tiajn kazojn, do interesa ekzemplo de pera funkcio de Esperanto, ĉu ne (sed kompreneble ajna alia nacilingva traduko povus same servi tiucele). Pli malfacila tasko estas trovi adekvatan germanan lingvaĵon, se oni volas iom konservi la lingvostilon de tiu tempo kaj samtempe krei lingvaĵon digesteblan por la nuntempa leganto. Tio ĉiam estas la problemo ĉe tiaj malnovaj, iom arkaikaj tekstoj. Do, la ĉefa defio aŭ arto de tia traduklaboro estas trovi la ekvilibron inter originala stilo kaj 'moderna' lingvaĵo.

*Ĉu via biografio estis lektorita ?*

Ne, la eldonejo ne disponigis lektoradon, aŭ eble kontraŭ alta pago. Iuj konatoj fakte ofertis sian lektoran helpon, ĉu senpage, ĉu kontraŭ honorario. Ambaŭ opciojn mi ne deziris kaj pro diversaj kaŭzoj do rezignis pri lektorado kaj klopodis kiel eble plej bone mem verki la tekston. Por sviso, kies denaska lingvo estas la alemana, la germana lingvo estas iusence fremdlingvo, sed kiel konate germanlingvaj svisoj nur parolas alemane, dum ili kutime skribas germane. Verdan lumon al la publikigo de miaj tekstoj mi donas ĝenerale nur kiam mi estas konvinkita pri ilia taŭgeco kaj sufiĉa matureco. Tio cetere same koncernas miajn esperantlingvajn tekstojn. Pro tio ofte necesas investi multege da tempo en la redaktadon de tiuj tekstegoj. En la fino, centprocente kontenta oni neniam povas esti. Malagrabla estas, ke restis ne malmultaj ortografiaj eraroj, kiujn parte plej verŝajne generis mia word-programo, kiel mi suspektas, kiu intermiksiĝis kun la Esperanto-ortografio. Ĉar dum la tralegado de la manuskripto mi ne vidis tiujn erarojn, kiuj aperis eble ankaŭ dum la konvertado al pdf kaj pro la ofta intersendado de la teksto inter mi kaj la eldonejo. Eble la eldonisto tro facilanime akceptis kaj presis tiun pdf-fajlon, kiu dependis fakte nur de mi mem.

*Ĉu vi planas duan eldonon ?*

Ĉio tio estas ligita kun laboro kaj kostoj. Nur se aperos iu meceno kaj donos kelkmil eŭrojn, dolarojn aŭ frankojn, tiam oni povos pensi kaj paroli pri dua eldono.

*Ĉu vi ne volas publikigi vian tekston en la interreto ?*

La aŭtoroj de Harrassowitz devas cedi siajn tekstojn al la eldonejo, do la kopirajto estas ĉe la eldonejo. Por eviti misuzojn, mi ĉiukaze ne publikigas la elektronikan tekston en la interreto aŭ plusendas ĝin retmesaĝe al aliaj personoj.

*Kiom da tempo vi investis en tiun laboron ?*

Mi ne kalkulis la laborhorojn. Ĉe 560 paĝoj eble temas pri inter 2500 kaj 3000 laborhoroj, se oni kalkulas po 5-6 horojn por ĉiu paĝo.

*Ĉu tute honorofice ?*

Jes. Bedaŭrinde. Persone mi alvenis ĉe la limo de honorofica laboro.

*Ĉu vi ne pensas, ke la aldona ĉapitro pri la aktuala evoluo de la Esperanto-movado ne estis nepre necesa ?*

La eldonisto de la libro deziris iun tekston pri la nuntempa evoluo kaj situacio de la Esperanto-movado. Alikaze mi ne estus aldoninta ĝin. Similan tekston mi jam aperigis en la svisa enciklopedio. Ĉe la teksto aperinta en la Zamenhof-biografio temas pri la prilaborita kaj kompletigita versio. Mi utiligas tiun tekston kiel bazon por kritikaj studoj pri la Esperanto-movado.

*Ĉu jam aperis reagoj aŭ recenzoj ĝis nun ?*

Aperis kelkaj unuaj spontanaj reagoj flanke de tiuj personoj, kiuj vidis aŭ legetis la libron, ĉefe neesperantistoj, kiuj trovis la libron interesa.

Liu Haitao verkis recenzon en la ĉina lingvo (kiun mi ne komprenas).

Necesas averti, ke la eldonejo elektis recenzoadresojn unuavice el judistikaj, lingvistikaj kaj kulturfilozofiaj medioj, do recenzoj probable venos el tiuj medioj. Aldonitaj estis kelkaj recenzoadresoj el la Esperanto-movado, sed ne ĉiuj estis akceptitaj de la eldonejo. Akceptitaj estas unuavice gazetoj kaj revuoj, ne individuoj. Recenzanto oni povas fariĝi, se oni ricevis oficialan recenzopropozonon de la eldonejo, kaj se oni akceptis ĝin, oni ricevas la libron, kaj la eldonejo atendas de tiu recenzanto, ke li aŭ ŝi efektive verkos recenzon. Tiu sistemo validas por ĉiuj libroj de Harrassowitz.

*Kion vi opinias pri la recenzoj de Hauptenthal, Lins kaj Wollenberg ?*

Sen eniri la detalojn mi povas nur diri, ke grandparto de tio kio estis skribita en tiuj "recenzoj" estas au sensenca blablablo, ŝvela superflua balasto, kiu ne povas esti serioze konsiderata de mi. Ĉe la resto temas probable pri esprimo de kritiko 'ad personam', ĉar aŭtoro de mia speco ja ne povas havi nur amikojn. Fakte neniu recenzanto sukcesis ataki la substancon de la verko mem (ĉar nenio estas atakinda au atakebla, krom eble la hagiografiaj elementoj, kiuj ankaŭ en mia Z-biografio ne estis eviteblaj), sed okupiĝis ĉefe pri formalajoj. Ĝis kiu grado temas en tiuj recenzoj ankaŭ pri potenciale antisemitismaj refleksoj karakterizaj por certaj ideologiaj kaj naciaj medioj kaj malrekte esprimitaj de la koncernaj aŭtoroj en siaj "recenzoj", necesus ankoraŭ analizi kaj pritaksi.

*Ĉu ion gravan vi forgesis mencii en via libro ?*

Ĝis nun forestas al mi tiaj ideoj pri gravaj mankoj, krom eble tiu detalo ke mi forgesis mencii (en piednoto aŭ en la bibliografio), ke la libro *La Juda Ŝtato* de Theodor Herzl estis tradukita al Esperanto. Ĝi aperis en 1934 en la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto. Ĉar tiu informo ankaŭ mankis en la koncerna artikolo de Vikipedio, do mi aldonis ĝin. La kazon de Niemojewski (1914) mi detale traktos en mia disertacio.

*Pri kia disertacio temas?*

Post akcepto de mia temo "Historio de la planlingva movado en orienta Eŭropo laŭ la ekzemploj de Ruslando/Sovetunio, Pollando kaj Bulgario" fare de iu germana universitato, mi estos dum 2011 okupata pri tiu projekto, kiu fakte konkludos miajn ĉirilatajn studojn, kiuj estis parto de mia universitata diplomverkaĵo de 1992. La spontana verkado de la Zamenhof-biografio, kiun mi cetere ankaŭ plenumis por iom forgesi la gravan okulmalsanon, kiu perturbis mian vivon dum la lastaj jaroj kaj kiu daŭre ĝenas min, do prokrastis tiun ampleksan disertacian projekton, priparolitan kun kun mia profesoro fine de 2006. Ĝin mi nun trankvile daŭrigos kaj finos, kun miaj plenaj sperto kaj kompetenteco, kiun mi intertempe disponas sur tiu temokampo.

*Kiel vi ĝenerale konkludas vian projekton ?*

Kompreneble mi estas tre kontenta, ke mi sukcesis publikigi tiun libron ĉe tia prestiĝa eldonejo ekster la Esperanto-movado, kio ja estas la revo de ĉiu iom serioza libroverkisto. Krom tio mi havis la okazon sen ajna tempo- au komerca premo verki libron laŭ miaj tute personaj imagoj. Tiu publikigo espereble malfermos novan spektron de interesiĝo pri la temo. La kunlaboro kun Harrassowitz estis dekomence ege glata, agrabla, profesieca kaj efika. Unika sperto.

Januaro/junio 2011